
# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo aprilo 2011**


## EKSPOZICIO EN MORATALAZ




Inter la 16-a kaj 29-a de aprilo Madrida Esperanto-Liceo organizos en la Kultura Centro Eduardo Chillida de la kvartalo Moratalaz ekspozicion pri Esperanto.

La ekspozicio utiligos la panelojn kreitajn de HEF okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, kaj kiujn oni montris en antaŭaj okazoj en aliaj kulturejoj de la urbo. Temas pri 15 pendeblaj afiŝoj 100 x 70 cm grandaj, en kiuj la diversaj aspektoj de la lingvo kaj la movado estas bildigataj per hispanlingvaj tekstoj kaj diversaj fotoj. Ili reprezentas enkondukon en nian kulturon, tiel ke vizitantoj povu poste pli vaste informiĝi.

## 70-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Daŭras la preparoj por la 70-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en San Lorenzo de El Escorial (Madrido) inter 28-a de junio kaj 2-a de julio 2011.

La programo de la Kongreso disvolviĝos laŭ la titolo: *"Esperanto 3.0 – E-agado en la 21a jc / En esperanto en el siglo XXI"*. La kerno de la programo celos analizi kiamaniere Esperanto adaptiĝos al la novaj uzoj de komunikado kiun la nuna epoko ebligas al parolantoj, kaj montros la manieron en kiu sinsekvaj generacioj de uzantoj kaj agantoj profitas el novaj informkanaloj.

Oni programos praktikajn ekzemplojn, en kiuj oni diskutos kaj utiligos novajn teknologiojn de eldonado, de distribuado de filmoj, de muziko. Malfermaj debatoj kaj atelieroj konsistigos centron de la programo pri la nunaj perspektivoj de la esperanta agado.

Grava estos la turisma flanko, nepra en tiu historia urbo kaj ĉirkaŭo. Estas nun organizataj vizitoj en San Lorenzo de El Escorial, interalie al la fama Eskoriala Monaĥejo, kaj ekskursoj al ĉirkaŭaĵoj. La dimanĉon 3-an de julio, estas programata postkongreso en la ĉefurbo Madrido, dum kiu eblos viziti la urbon mem kaj kelkajn ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn.

## ESPERANTA FAKO EN MADRIDA LIBREJO

La 8-an de aprilo estos malfermata Esperanto-fako en la anarĥiista librejo "La Malatesta" (strato Jesús y María, 24 - Madrido) kiun nutros la libroservo de SAT-en-Hispanio. La sekcio komenciĝos je la 19:30, per evento publika, kie anoj de SATeH prelegos pri la rilato inter Esperanto kaj liberecanaj medioj.

## OKAZIS DUM MARTO

La 11-an de marto okazis en la librejo Malatesta prezentado de la libro *"Anarquistas - Un siglo de movimiento libertario en España"*, fare de la aŭtoro, Dolors Marin. La libro entenas tutan ĉapitron dediĉitan al esperanto, proksimume 40 paĝojn, pli malpli dekonon el la tuta verko.

Okaze de la Tago de la Poezio, la 21-an de marto, Jorge Camacho legis poemojn en la hispana kaj Esperanto en publika evento organizita en la Nacia Biblioteko.

Manolo Pancorbo prelegis pri Esperanto en sidejo de la Ruĝa Kruco, invitite de la asocio Acervo Intergeneracional de Galapagar, la 30-an de marto.

## EKSKURSO AL ALMADENO

Madrida Esperanto-Liceo organizis viziton al la mina komplekso de Almadeno por la unua semajnfino de aprilo. Partoprenis 15 homoj, sumante membrojn kaj simpatiantojn. Surloke kaj subtere ni ricevis detalajn informojn pri la historia evoluo de la teknikoj por eltiri la mineralon cinabron kaj el ĝi la metalon hidrargon, pri la sociaj vivkondiĉoj de la ministoj, kaj ni povis mem konstati la fizikajn ecojn de tiu kurioza metalo. Per la cetera tempo, iuj turismis en proksimaj vilaĝoj, aliaj marŝadis tra la bela natura ĉirkaŭaĵo aŭ simple ĝuis la trankvilan etoson de la historia urbeto. Ĉiujn ravis la sepjara Jasna, denaska esperantistino, ĉiam atenta por cenzuri ajnan krokodiladon.

## VIZITIS MADRIDON

Dum du monatoj restis en Madrido ĉeĥa esperantisto Jarmil Ĉervenka, afabla kaj kurioza homo, kiu ĉiam surprizas vin per rakontado de siaj sennombraj vojaĝoj. Dum sia restado li frekventis niajn lundajn babiladojn kaj tiel helpis nin ne krokodili.

La unuan semajnon de marto vizitis Madridon, pro laboraj kaŭzoj, menorka esperantisto, nun loĝanta en provinco Taragono, Pere Quintana.

Unu semajnon restis en Madrido en turisma vizito flandra esperantisto Ivo Durwael, konata aktivulo de FEL kaj implikiĝanta en la revuo "Monato", kun lia edzino Clara Claes kaj filo Tim.

## EN AMASKOMUNIKILOJ

La 28-an de marto pluraj ĵurnaloj de Grupo Vocento (interalie "El Correo" el Bilbao, "El Norte de Castilla" el Valadolido, "Diario Vasco" el Donostio, "Las Provincias" el Valencio, "Hoy" el Badaĥozo, "Sur" el Malago, ktp, sed ne la madrida "ABC") aperigis kvarpaĝan raporton pri Esperanto. Ĝi konsistis el du partoj, unu pri la lastatempa evoluo de la lingvo, kaj specife de la reta uzado. La alia pri la eblecoj de vojaĝo pere de Pasporta Servo.

La sekvan tagon estis intervjuita Manolo Pancorbo en la programo "La Ventana" de la radioĉeno SER. La ĉefa temo estis Pasporta Servo, kaj oni ĝuis ankaŭ la telefonan partoprenon el Kalifornio de argentindevena amiko Enriko Ellemberg.

La madrida televidstacio TeleMadrid kontaktis nin por pretigo de raporto pri nia lingvo. Tre probable filmado okazos la vendredon 8-an de aprilo, kaj la elsendo dum sekva semajnfino. Kontaktu la adreson de Liceo se vi deziras partopreni en la pretigo de la novaĵo.

Jorge Camacho estis intervjuita ĉe Radio de la Universitato Complutense, Info Radio. La programo estos aŭskultebla la 10-an de aprilo, dimanĉe, je la 16:00. Eblos ĝin aŭskulti pere de jenaj ligiloj: http://inforadioucm.es/ aŭ http://complumedia.ucm.es/canal.php?p1=inforadio.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversaciaj rondoj plu okazos regule ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7, tel. 914 468 079. Pri aliaj renkontoj, atentu la retajn diskonigojn en la retforumo esperanto_madride http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com